

# KOMENCANTO

---

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



---

Emile Malanda Nianga [Kinŝasa, Kongo]

2003

Kiel Ĵomart kaj Nataŝa, famaj kantistoj el Svedio, iĝis komencantoj literatur-historiaj paĝoj — prozo kaj originala poezio de niaj legantoj Anatolo Gonĉarov invitas al la lando "Legio" — gramatiko serĉe kaj serioze tempo kaj homoj — neelpensitaj historioj — aforismoj — anekdotoj diversaj ondoj el bunta mondo — invitoj kaj informoj — korespondu!

3

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorůka 1, CZ-696 62 Stržnice

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuressaare.

**Finnlando** Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

**Francio** ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143, Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## Redakcie

*Karaj legantoj!*

*Ni esperas, ke en tiu ĉi kajero de "Komencanto" ĉiu trovos materialon por la legado konforme al siaj interesoj kaj animinklino. Vi renkontos kelkajn novajn nomojn, inter ili niaj debutantoj Aleksandr Morev el Rusio, Cui Jiayou el Ĉinio kaj Boguslaw Sobol el Pollando, kiuj prezentas siajn kapablojn en diversaj rubrikoj.*

*Nataša Gerlah kaj Ŝomart Amzejev, la bela paro el Svedio rakontas pri sia esperantistiĝo. Interalie, estas unua prezento de la familia paro en nia revuo. Sed ni scias, ke en Esperantujo kamlaboras multaj tiaj duopoj, ni persone konas pli ol dek. Kaj ni invitas ĉiujn rakonti pri tiaspeca fruktodona kunlaborado de E-paroj!*

*Ni finas prezenton de la Skota skolo en E-literaturo per rakonto pri J. Francis kaj J. Dinwoodie. Estas por ni agrable ricevi reehojn, ke en kelkaj kluboj kaj rondoj oni uzas materialojn el nia literatur-historia rubriko por siaj lecionoj.*

*Ni esperas, ke rakontoj kaj originala poezio sur la paĝoj, disponigitaj por literaturaj provoj de la legantoj, donacos al vi kelkajn ĝuidajn momentojn. Por la unua fojo por "Komencanto" prezentas sian tre interesan studon pri la utilo kaj efiko de legado A. Gonĉarov, konata Rusia esperantisto, aktivulo kaj E-instruisto. En la rubriko "Tempo kaj homoj" ni daŭrigas publikigi la "Bildojn de infaneco" de E. Walker el Britio. Ne preteratentu ankaŭ la interesan rakonton de nia leganto el Svedio R. Jalming pri Gotenburgo - la urbo de UK-88.*

*Ni publikigas speciale faritan por "K" prezenton de la neordinara lernolibro "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo.", kiun afable sendis al ni la aŭtoro - akademiano Boris Kolker el Usono.*

*Karaj legantoj, ni deziras al vi, ke somero estu por vi ne nur bona ripoztempo, sed ankaŭ estu plena de la impresoj, pri kiuj vi, inspirinte rakontos en viaj verkoj sur la paĝoj de nia revuo!*

## KOMENCANTO

2003 numero 3 // (39) // 6 numeroj jare  
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2003:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".  
La sola kondiĉo - nepre menci **KOMENCANTO**'n,  
la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

## Kiel tio komenciĝis

## Natalja Gerlah kaj Ĵomart Amzejev

konataj tra la tuta Esperantujo kantistoj, muzikistoj kaj komponistoj

## Kaj de la 1987-a ni ĉiam estas kune...


## Natalja Gerlah.

Mi naskiĝis en malgranda urbo Kentau, sude de Kazahio, kie daŭre loĝas miaj gepatroj kaj gefratoj. Mi vizitis du lernejojn samtempe: mezlernejon kaj muzikan lernejon (lernis ludi pianon).

Tuj post la gimnazio, en 1985, mi komencis studi ĉe Pedagogia Instituto al instruistino pri fiziko kaj matematiko. Tie mi renkontis Ĵomart, kiu gvidis muzikan bandon, al kiu mi aliĝis la unuan tagon de miaj studoj. Krom la muziko mi ankaŭ lernis Esperanton de Ĵomart. Mi ŝatus malkovri ke Ĵomart "postkuris" min dum 3 jaroj antaŭ ol tio finfine tediĝis al mi kaj ni estiĝis la paro. Kaj de la 1987 ni ĉiam estas kune. Do mi ege ĝojas ke li ne plu tedas min (kaj mi esperas ke mi ne tedas lin) — ni ja estas kune dum 16 jaroj!

En Svedio mi daŭrigis studi, unue la lingvojn (svedan kaj anglan). Mia profesio tute ne rilatas al muziko, mi ĉiam preferis ciferojn kaj logikon. Translokiĝinte al Svedio mi elektis komputilfakon. Poste mi komencis labori kiel konsultanto pri e-poŝtaj servilsistemoj de Microsoft ĉe malgranda firmao. Nun mi prizorgas *mail-sistemojn* de eksteraj entreprenoj, kiel Sony ks.

Miaj hobiaj (krom Esperanto): aerobiko, kurado dum somera tempo, biciklado, laboro kun PhotoShop kaj hejmpaĝoj (mia lasttempa hobia). Mi ege ŝatas paŝigi liberan tempon ĉe la naturo kun miaj familianoj kaj ni ĉiam ĝuas la tempon kune.



- *Kial vi translokiĝis de Kazahio al Svedio?*

**Ĵomart:** Ĉio okazis tute neplanite. Ni estis en Norvegio, kaj laŭ la vojo hejmen, al tiama Sovetunio, okazis milita puĉo en Moskvo (1991) kaj... ni decidis resti en Svedio.

- *Ĉu tre malsamis tiam la E-medio en Svedio, kompare kun tiu de Sovetunio?*

**Ĵomart:** Fakte jes... Sovetaj esperantistoj estas tute malsimilaj al svedaj esperantistoj, same kiel Sovetio kaj Svedio, sed niaj E-amikoj multe helpis nin en nia nova lando. Kaj ni estas ege dankemaj al ili pro ĉio.

**Nataŝa:** Ĉu vi scias ke "Valso por amikoj" estas dediĉita al ĉiuj niaj amikoj, sed precipe al la svedaj?!

- *Kio signifas kanti en Esperanto por la duopo Ĵomart kaj Nataŝa?*

**Ĵomart:** Mi eĉ ne scias kion respondi... Por mi kanti ĉiam estas dialogo, interparolo kun la aliaj. Por mi gravas, ke ekzistas iu, kiu aŭskultas kaj komprenas min. Ĉu estas nur kelkaj homoj aŭ plena halo kiu aŭskultas, tio ne tre gravas.

**Nataŝa:** Ĉion! Vi ne povas imagi kian ĝuon ni trasantas kantante por "Nia" publiko, kiu inspiras ĉiun nian vorton, kiu sekvas ĉiun nian enspiron. Tiu atmosfero, kiu establiĝas dum multaj niaj koncertoj simple ne estas forgebla! Kaj ni ege dankas nian publikon pro tiu interkompreno kaj revelacio, kiun ĝi donacas al ni, ĉiufoje, kiam ni staras sur scenejo. Dankon!

- *De kie vi ĉerpas inspiron verki viajn muzikaĵojn, Ĵomart?*

Mi ne faras ion specialan por kapti la inspiron. Simple foje al mi ŝajnas, ke iu temo estas aktuala aŭ interesa por rakonti al aliaj homoj.

- *Ĵomart kaj Nataŝa laŭ Ĵomart kaj Nataŝa.*

**Ĵomart:** Ni estas tute "normalaj" homoj. Familio por mi nun estas tre grava. Muziko kaj Esperanto helpas nin trovi nian lokon en la vivo, kaj renkontiĝoj kun niaj aŭskultantoj donas al ni energion por krei denove.

**Nataŝa:** Mi ne volas esti tre kritikema, sed iu muzikisto mi tute ne estas. Dio, (aŭ mia patrino) donacis al mi voĉon kaj Ĵomart vere batalis por prilabori ĝin. Do tio, kion vi aŭdas kiam mi kantas - estas laboro de Ĵomart. Sed mi ŝategas kanti. Kaj ne nur kanti - mi ŝatas tiun silentan interparolon, kiu kreiĝas dum niaj koncertoj. Kaj kiam ni ne plu kapablos krei tion, ni ŝajne ne plu kantas... sed mi esperas, ke tio neniam okazos!

- *Kiuj estas viaj estontaj planoj rilate al E-muziko?*

**Ĵomart:** Ni planas eldoni novan KD-n ĉi somere, kun novaj kaj, eble, kun kelkaj prilaboritaj malnovaj kantoj. Ankaŭ estas planata partopreno ĉe IJK en Svedio. Ĝenerale mi povas diri, ke ni ne planas ĉesi kanti.

## Ĵomart Amzejev.

Naskiĝis, studis, militservis, denove studis... k.t.p. Estas interese, ke la unua artikolo, kiun mi legis post la militservo, estis pri Esperanto. Mi revenis de la militservo, en la jaro 1978, kaj mia fratino rakontis al mi pri iuj korespondaj kursoj de Esperanto - tio estis serio de artikoloj-lectionoj de Boris Kolker. Ĝuste tiam mi esperantistiĝis kaj tiel komenciĝis mia Esperanto-vivo!

Por ne esti la sola esperantisto en mia urbo (Ĉimkent, Kazahio), mi aranĝis E-kurson en Pedagogia Altlernejo, kie mi laboris. Tiel aperis mia e-bando "Kredo". Nataŝa kaj mi estas "restaĵo" de la bando. Kiel E-dueto ni ekzistas dum jam multaj jaroj. Mi ankaŭ partoprenis multajn eks-sovetiajn E-aranĝojn kiel sola artisto.

Nataŝa kaj mi estas geedzoj kaj ni havas filinon, Karina, kiu naskiĝis en la jaro 1995, vintre. Ni esperas, ke ni iam kantos triope!

Mi ĵus finstudis por iĝi profesia sonteknikisto. Mi ja ĉiam estis interesita pri muzika registrado, kaj nun tio estos, espereble, mia profesio.

Krom Esperanto kaj kantado mi ankaŭ ŝatas *ĝiu-ĝutsu* (japanan luktarton). Legado kaj biciklado estas aliaj miaj interesoj. Ekde 1991 mi loĝas en Stokholmo, Svedio. En Kazahio restis mia patrino kaj unu fratino

# La tria periodo de esperanta literaturo

*La skota skolo*

Karaj legantoj! La prezento de ankoraŭ du aŭtoroj-"kvaropanoj" - J. Francis kaj J. Dinwoodie - finas la rakonton pri la fama skota skolo sur la paĝoj de nia literatur-historia rubriko.

John Islay Francis estis skota licea profesoro. Li naskiĝis en 1924, eklernis Esperanton ĉirkaŭ 1942 en Helensburg, kiun li transloĝiĝis kun sia vidvina patrino en la komenco de la milito. En tiu tempo, estinte samlerneano de W. Auld, J. Francis amikiĝis kun li. En sia aŭtobiografio W. Auld rememoris: "...Ni fariĝis plej intimaj amikoj, kaj li lernis Esperanton pro mia rekomendo. Ni ekuzis Esperanton inter ni kaj tion ni daŭrigis, kiam ni ambaŭ aliĝis al la flugarmeo (li estis bombaviadisto)... Sub la influo de Reto (*R. Rossetti - la red.*) mi kaj John... decidis ne plu uzi la anglan lingvon inter ni. Ni kune studis. Ni ofte starigis vortludon: ni sidis en mia aŭ lia ĉambro kaj mi demandis lin "Kiel oni nomas en Esperanto la floron "lesser celandine"? Kaj li devis tuj respondi: "Keli-donio" aŭ li perdis unu poenton, kaj inverse. Tiel ni ekhavis vortprovizon, kiun ni ne havus el simpla studado de literaturo aŭ per konversacio en grupo..."

Kiel E-verkisto J. Francis aktiviĝis post la Dua Mondmilito. Li tradukis por "Angla Antologio", kontribuis al revuoj "La Nica Literatura Revuo", "Esperanto en Skotlando" k.a.

En 1952 li debutis per poemciklo "La Kosmo" en la jam menciita poemaro "Kvaropo". Kiel moto al ĉi tiu ciklo J. Francis elektis poemon de N. Kurzens. Du lastaj ĝiaj linioj: "ne sufiĉas nur vivi kaj vivi - aktivi necesas!" respiegulas ankaŭ vivkoncepton de J. Francis.

Lia plua verko "Vitrilo", aperinta en 1960, estis kolekto de noveloj kontraŭ pseŭdomoralo, tiranismo, potencavido, k.t.p. Duono de la noveloj estis realismaj rakontoj el la vivo, dum la alia duono estis verkita en la fabelformo, kaj en tiuj satiraj kaj simbolaj fabeloj troviĝis karikaturoj de komune homaj karakteroj kaj rilatoj.

Lia ampleksa romano "La granda kaldrono", verkita en sesdekaj jaroj, aperis nur fine en 1978. Ĝi estis realisma familia sagao.

Krom la supraj verkoj aperis el lia plumo: en 1982 sciencfikciaĵo "Misio sen alveno" kaj en 1997 "Tri rakontoj pri la Miljara paco".

Kvankam verkaro de J. Francis ne estas tre ampleksa, li sendube estas unu el signifaj aŭtoroj de la triperioda esperanta literaturo kaj liaj verkoj meritas pli vastan rekonon inter la legantoj.

John Islay Francis

(romanfragmento)

## La granda kaldrono

Malgraŭ la medikamento, la doloroj de Jano fariĝis entute pli turmentaj. Ne tiom la kruroj, krom ĉe la surfaco, sed aliaj partoj, pri kiuj li antaŭe ne sciis, ekanoncis sian suferdoloran ekziston, kaj la vizaĝo estis arde dolorega.

... Poste la doloro fariĝis tiel intensa ke li devis streĉi ĉiujn fortojn por kontraŭbatali ĝin. Li revokis Militzan en la memoron tiucele, kaj iom moliĝis la suferadon prezentante ĝin al si en erotika revo, kvankam la erotiko mem estis plezuriga pli en memoro ol en la revo aktuala. Li estis kondukinta sin tra pluraj aventuroj kun dentogrinca heroeco, kiam iu paralelo en lia revo kondukis lin subite reen al realo, al la senglora fino de lia unua operacio.

Li fuŝis. Plaŭdis post unua operacio. Nenecese kaj stulte plaŭdis. Spite radiovokojn kaj stelsignalon li venis en kolizian proksimon kun kamarado, kamarado kun alteriĝa prerogativo pro damaĝita motoro, eble ankaŭ vundita. Kion la skadro pensis pri tio? Certe devis ŝajni al ili ke li estas aŭ tro stulta por kompreni simplajn signalojn, aŭ tro senrespondeca por obei ilin.

Kio okazis al la alia maŝino? Li penis memori ĉu li vidis ion dum la falo, sed povis memori nenion krom la leviganta tero. Se ĝi frakasiĝis pro lia stulto! En la animo de Jano kirligiĝis konjektoj, timoj kaj senkulpigoj. Li senpacience atendis la alvenon de siaj vizitantoj, kaj samtempe preĝis ke oni forsendu lin al iu neatingebla malsanulejo, kie ili ne povos trovi lin: li volis aŭdi kio okazis al la alia maŝino kaj klarigi pri la malfunkcio de sia radioaparato, sed li timis iliajn riproĉojn, kaj, eĉ pli, eventualajn malsincerajn kondolencojn ("Ne tro ĝenu vin pri kompatinda Blanko; estis nur akcidento, kaj ni ĉiuj ereremas.").

Ĝis kiu grado lia klarigo pri radioaparato senkulpigos lin? Ĝis kiu grado emfazos lian senkompetenton? Kion li devis fari en la koncerna konjunkturo? Li ja antaŭ ekflugo kontrolis aparaton, sed ĉu estas iu rutino kiun li devis provi por ripari ĝin, aŭ ĉu li devis iel sciigi sian ĉefon pri la malfunkcio? Li streĉis la memoron serĉante solvojn al tiuj demandoj, kaj timis trovi...

\*\*\*

## IV. La morto de la mondo

(Fragmento el poemciklo "Kosmo" el la poemaro "Kvaropo")

Sed la genio homa pro lukso jam torporas:  
kun ĉio laŭ deziro homaro ne plu penas.  
La adoptitaj astroj al li do ekvaloras  
kiam la mondo propra vivadon ne subtenas;

ĉar tien li rifuĝas de la mortanta mondo,  
sen povo kontraŭstari la ŝanĝojn de naturo.  
La atmosfero raras; etende, ond' post ondo,  
glimbrilas salaj dunoj: silentas ventsusuro.

Pludaŭras vivopovo sur la planedoj, kie  
sin armas kontraŭ velko kondiĉoj homfaritaj.  
Sed morto devas veni finfine, senpasie,  
sed nepre; ĉar tenebras la vojoj sunorbitaj.

La suno mem formortas, elkonsumiĝas nigre.  
Sen koro kaj fokuso la universo giras.  
El la antaŭaj orboj planedoj vagas migre,  
frakase karambolas, sencele plueniras.

\*

**John Sharp Dinwoodie** estas la dua "kvaropano", kiun ni nun volas prezenti. Laŭ profesio li estis pastro; li naskiĝis en 1904 en la suda parto de Britio, sed ekde 1942 kiel pastro servis en norda vilaĝo. J. Dinwoodie estis la plej aĝa el ĉiuj aŭtoroj de la poemaro "Kvaropo" kaj tiu fakto certe kontribuis al la matureco de liaj verkoj. Sendube ankaŭ la profesio influis lian viv- kaj mondrigardon: la inklino al simpla, kvieta vivo aperas en multaj liaj poemoj. Lia senpasia temperamento emigas lin al rezigno, kontenteco pri la simplaj vivoĝuoj".

Ciklo "Kastelo el revoj" estas la sola poemaro de Dinwoodie, kiu aperis en "Kvaropo" en 1952, post kio li eksilentis kiel originale verkinta poeto kaj precipe tradukis. Liaj poemtradukoj aperis en "Angla Antologio" (1957). Li estis unua redaktoro de "Skota Antologio" (1978), kontribuis al "Literatura Mondo". Sincera, simpla, natura prezentmaniero de J. Dinwoodie de siaj moralaj travivaĵoj en la poemoj, ŝajnas, ne povas ne konkeri la legantojn.

Ĉi tie vi povas tralegi fargmentojn el la diversĝenraj verkoj de J. Dinwoodie.

## La Ŝtormo

(fragmentoj el la novelo de J. Dinwoodie)

Kiam mi eniris la ĉefstraton de malgranda vilaĝo, ĝi estis tute senhoma, krom ke unu maljunulo per la helpo de marŝbastono malrapide iris en la direkto al la haveno kaj mi sciis, ke la vilaĝanoj troviĝos tie, kien li iras. Estas tre strange, kiamaniere la fiŝkaptistoj, kiuj vivas per la maro, ekkonscias per ia telepatio, kiam danĝero minacas ŝipon, propran aŭ fremdan.

... La ŝtormo estis komenciĝinta senaverte. La antaŭtagmezo estis griza tamen senventa, ĝuste tia tago, kian ofte vidas en la monato novembro tiuj, kiuj loĝas sur la bordo de norda Maro: sed antaŭ nur unu horo ekblovis la ventego kun la subiteco de neatendita vangofrapo, kaj la ondoj fariĝis pli kaj pli altaj kaj grandaj.

... Tiam mi komprenis, kial mi sentis ion nekutiman en la silento de la homamaso. De kiam mi ekloĝis en la vilaĝo, neniam danĝero trafis iun el la ŝipetoj apartenantaj al ĝi, sed tio estis unu el "niaj ŝipetoj", kaj ĝia estro estis populara junulo, kiu edziĝis antaŭ nur du semajnoj. Kune kun li en la ŝipeto, mi sciis, estis liaj du plijunaj fratoj kaj du kuzoj: ĝi estis, laŭ nia dirmaniero, "familia ŝipeto".

La ŝipeto ŝajnis alproksimiĝi al ni laŭ eksterordinara rapideco. Vere ne tiel estis: ĝi venis malrapide, sed pro la fakto, ke ĝi alproksimiĝas al ebla katastrofo, ĝi ŝajnis veturi rapidege. Kaj ja katastrofo estis ne nur ebla sed verŝajna. Nia haveno ĉiam estas malfacile enirebla kiam la maro estas malkvieta, kaj ĉar la ondoj tiam kuris tiel furioze, estus ago de frenezulo provi eniri.

... Ŝajnis, ke la ŝipeto pli kaj pli rapide alproksimiĝas, ĝis fine ni povis vidi la homojn sur la fardeko. Ĉiuj staris tenante la direktilon, pretaj movi ĝin per la tuta forto tuj kiam la ŝipestro, kiu staris en la ferdekmezo juĝante la distancon, donos la ordon gvidi la ŝipeton trans la ondojn al la havena enirejo. Estis vana espero; la ŝipeto rifuzis respondi al la direktilo; ĝi estis kvazaŭ en la senkompata mano de giganto, kiu rifuzis liberigi ĝin sed pelis ĝin nerevokeble preter la enirejon. Dum ĝi preterdrivis la atendantan homamason la juna ŝipestro levis la manon: ŝajnis al mi, ke li ne faras salutgeston, sed nur senkonscian geston de rezignacio.

Ĉirkaŭ mi viroj kaj virinoj falis surgenuen kun manoj suprenlevitaj. Larmoj sin miksis kun la pluveroj sur la vizaĝoj de la virinoj, sed la viroj ne ploris. Ili staris kun nekovritaj kapoj kaj palaj senesprimaj vizaĝoj, tamen profunde en iliaj koroj bolegis malamo al ĉi tiu monstro, kiu prenas antaŭ iliaj okuloj ankoraŭ kvin viktimojn en la eterna lukto inter ĝi kaj homaro...

## John Sharp Dinwoodie

Fragmento el ciklo "Dornoj kaj rozoj"  
el poemaro "Kasteloj el revoj"

Neniam mi aspiris honorojn de la mondo:  
la simplaj vivoĝuoj, la familia rondo  
por mi sufiĉis.

La vivo al mi donis amikojn simpatiajn,  
edzinan amon, hejmon, aliajn benojn tiajn,  
kaj mi ja riĉis.

Al ĉefaj honorseĝoj aliaj homoj strebu:  
antaŭ okul' ilia renomvizio ŝvebu —  
mi ne enviis.

Mi sentis min feliĉa en tiu viv' trankvila:  
ne ambiciis mi, kaj de la voj humila  
mi ne deviis.

Ĉar estas en la alto ĝenaj spiritturmentoj.  
Sur la sterilajn montojn mortige frostaj ventoj  
eterne blovas.

Nur en la valo sube povas la arb' burĝoni,  
nur en la suna varmo kaj ŝirmo plena oni  
la rojojn trovas.

En mia vivovojo la rozojn mi delektis,  
kaj en girlandon belan mi ilin ame plektis  
en asiduo,


la vivon pasigante en kvazaŭ Arkadio,  
laŭ la malsaĝa kredo, ke ilin donis Dio  
por mia ĝuo.

Sed dum mi tra la mondo senzorge-ĝue paŝis,  
for de okuloj miaj la vivoroj kaŝis  
la mondsignon,

ĝis Dio prenis dornon kaj per la pikdoloro  
animon mian vekis, kaj vidis mia koro  
pli vastan vivon.

Min akre kaj dolore per tiu dorna beno  
elvokis tiam Dio el mia vivmalpleno  
kaj egoismo:

mi trovis ĝojon veran anstataŭ ĝoj' miraĝa,  
ĉar hom' ne vere vivas, se tenas lin la aĉa  
kontentabismo.



Prokopjev Dmitriĵ [Ĉaŝi, Rusio]

**Boguslaw Sobol**  
[Milanowek, Pollando]

## Mikuś

Vekiĝas tago... La unuaj sunradioj rigardas tra fenestro, malkuraĝe kisas murojn de la ĉambro, tuŝas la vizaĝon de Joĉjo. Li malfermas la okulojn. Apud lia lito staras hundo.

— Vekiĝu, - parolas liaj brilantaj okuloj.

— Ellitiĝu, — ŝajnas diras Mikuś kaj metas la piedon sur la liton, lekante samtempe la manon de Joĉjo. Mikuś atendas, malpacience rigardas. Kion fari? Joĉjo malrapide ellitiĝas kaj komencas vestiĝi. La hundeto dancas, saltas, deziras helpi - ne povas elteni kaj longe atendi. Liaj okuloj ridas.

Joĉjo prenas ŝlosilon kaj kun amiko Mikuś forlasas hejmon.

Estas frua mateno, sennuba ĉielo, belega vetero. Bonodoras siringo. Kelkaj birdoj sur la tegmento komencas kanti serenadon. Amikoj direktiĝas al la herbejo. Ili trairas stratojn, mallongajn vojojn. La hundeto rapide kuras, Joĉjo malrapide trotras. Baldaŭ ili atingas la celon - verdan herbejon. Apude fluas rivereto kaj videblas malgranda arbareto. Mikuś haltas kaj atente rigardas. Kio okazas? Jen saltas en la herbo kelkaj leporoj. La hundo rapide komencas kuri kaj baldaŭ malaperas.

Joĉjo atendas, dume la hundo ne videblas. Li proksimiĝas al la rivereto, kies akvo maltrankvile lirlas. Ĉirkaŭe flugas malgrandaj muŝoj. Sur la floro sidas abelo, preskaŭ apude kuraĝe najbaras diverskolora papilio.

La suno leviĝas sur la brakoj de la ĉielo kaj ĵetas ĉiam pli fortajn radiojn sur la teron. Sed Mikuś ne revenas. Joĉjo maltrankvile atendas. Kiel longe ankoraŭ? Ja baldaŭ tagmezo kaj ili devas reveni hejmen. Li larĝe malfermas la okulojn. Jen videblas iu malgranda punkto, kiu poiome kreskas. Jam estas videbla la tuta hundo, kiu proksimiĝas kaj preskaŭ ploras. Kio okazis? Bedaŭrinde, li ne nur malsukcesis kapti la leporon, sed io malbona okazis al li mem, ĉar Mikuś lamas kaj hurletas. Joĉjo kaj la hundo iom malĝoje revenas hejmen. Hejme Mikuś multe trinkas akvon, poste lekas sian piedon. Tiel finiĝis matena promonado.

Traduko de **Daŝa Dolmatova** [Jelec, Rusio]

**I.A. Bunin**


## La kapelo

Varmegas somera tago. En la kampo, post la ĝardeno de la antikva bieno, estas delonge nezorgata tombejo, - montetojn kovras altaj floroj kaj herboj kaj staras sola, tute ĉirkaŭigita per sovaĝe kreskantaj floroj, herboj, urtikoj kaj onopordoj, detruiganta brika kapelo. Infanoj el la bieno, kaŭrante apud la kapelo, per atentaj okuloj enrigardas tra mallarĝa kaj longa frakasita fenestro, samnivela al la tero. Tie nenio videblas, de tie nur blovas malvarmo. Ĉie helas kaj varmegas, sed tie estas malhele kaj malvarme: tie, en feraj kestoj kuŝas iuj geavoj kaj ankoraŭ iu viro, kiu mem mortpafis sin. Ĉio tio ĉi estas tre interese kaj mirinde: tie ĉi ĉe ni sunas, estas floroj, herboj, muŝoj, burdoj, papilioj, ni povas ludi, kuradi, ni timas, sed samtempe gaje kaŭradas, sed ili ĉiame kuŝas tie en la mallumo, kvazaŭ en nokto, en la dikaj kaj malvarmaj feraj kestoj; la avoj kaj avinoj ĉiuj estis maljunaj, sed la viro estis ankoraŭ juna..

— Pro kio li mortpafis sin?

— Li estis tre enamiĝinta, kaj kiam oni estas tre enamiĝintaj, ĉiam oni mortpafas sin...

En blua maro de la ĉielo, kvazaŭ insuloj, kelkloke blankas belegaj nuboj, la varma vento de la kampo portas dolĉan odoron de floranta sekalo. Kaj ju pli forte kaj pli gaje varmegas la suno, des pli malvarme blovas el la mallumo, el la fenestro.



**Vinnikova Nina** [Novoaltajsk, Rusio]

**Cezar** [Altenburg, Germanio]

## Buntaj teleroj

Ni sidas sub unu el niaj aceroj  
kaj matenmanĝas.  
Ambaŭ ni ankoraŭ baraktas  
kontraŭ certa dormemo.

Sed nun mi hazarde ekvidas,  
spite al mia kutima blindeco,  
la sunfloron sur la kartontelero  
de mia neeldorminta Donjo,  
la floro preskaŭ tiel belas  
kiel la suno en la blua ĉielo  
super ni.

Hieraŭ vespere ni trinkis  
tro da biero kaj sekan ruĝan vinon  
kun niaj najbaroj, kiam ni babilis  
post la kartludado ankoraŭ  
pri la tempo, kiam GDR ankoraŭ  
ekzistis, kaj mi studis en Halle  
marksisman-leninisman filozofion.

Plie mi ankoraŭ sentis la  
bicikladon  
de la antaŭa tago en miaj rigidaj  
ostoj.

Sed nun mi rigardas  
ankaŭ mian kartonteleron  
kaj vidas tie amuzigajn  
infanecajn desegnaĵojn  
de enamiĝinta paro sur multaj  
momentbildoj:

La ridanta striovireto  
veturas per ruĝuoj  
kun koro sur la mano.  
Aŭ li portas florojn kun amletero  
aŭ grandegan florpoton  
aŭ... kion ajn - al ŝi!

Ŝi etendas feliĉe la brakojn,  
flaras la odoron de ruĝa rozo.  
Blanka suno sur la flava telero  
ridas  
kun ruĝa koro ĉe la rando.  
Nigrablanka hundeto sidas tute  
nedanĝere en alia angulo.

La amparo mano en mano  
promenas  
inter floroj sur somera herbejo.

Kion diri?  
Mi estas tuŝita,  
mia dormemo subite forflugis,  
kaj mi devas rideti.

La artaj buntaj teleroj helpis nin  
ne esti plu tiom grumblaj,  
frumatene  
en nia rifuĝejo, proksime de lago,  
ĉe nia malgranda ronda kaj blanka  
matenmanĝotablo.

Nu, kaj kiu en superbazaro  
elektis la buntajn telerojn?  
Kompreneble mi mem,  
la familia respondeculo por  
artaj aferoj. Sed mi konfesas:  
sen tiam efektive  
rigardi ilin.

✱


**Aleksandr Morev** [Puŝkin, Rusio]

✱ ✱ ✱


Mi vagas tra rava arbaro  
Dum nokto, en songo mia.  
Ie bruas senlima maro,  
Gutoj brilas sur branĉoj abiaj.  
Ho, arbar' el fabelo infana!  
Kie sorĉaj tintetas klingoj,  
Kaj, en aer' diafana,  
Ien flugas anseroj-cignoj.  
Kaj, kun kandel' en la mano,  
Angoron pelante for,  
Belulino, carino-rano  
Mitojn kantos al mi ĝis aŭror'.

✱ ✱ ✱

Malvarma kafo, blinda monitor'.  
Nur cigaret' fumiĝas en la mano.  
Denove splen', denove la angor'  
En foliet' de mia vivromano.  
Kuŝante sur fotelo dormas hundo,  
Ĝi estas bona, ĉar ĝi simple vivas.  
Nenion scias pri anima vundo,  
Nek, kiel la animo nokte krias.



Kombinaĵo el bildoj de N. Vinnikova kaj Ju. Perevalov [Novoaltajsk-Lesnoj, Rusio]



*Ni publikigas leteron, kiun sendis al la redakcio konata rusia esperantisto, dum pluraj jaroj instruisto de nia lingvo Anatolo Gonĉarov. Tio ne estas simple letero-alkoko "Multe legi en Esperanto", sed bone ilustrita per ekzemploj rakonto pri la vojoj de riĉiĝo de nia lingvokono.*

Miaj karaj, estimataj ek-esperantistoj!

Mi ekamis esperanton kaj estas feliĉa pro tio. Mi dum 43 jaroj uzas kaj ĝuas tiun lingvon. Sed mia ekamo kaj profunda ekono de la lingvo esperanto okazis nur dank' al multa multega legado de E-libroj kaj revuoj. Mi tralegis kelkajn centojn da E-lingvaj libroj kaj cent-dekojn da revujarkolektoj. Post tio mi konvinkiĝis ke pri esprim-eblecoj la E-lingvo estas pli riĉa ol ajna nacia lingvo.

### ...ne kialo, sed kialino.

Foje en iu kunveno de Barnaula E-klubo, mi demandis ĉe klubano: "Kial vi ne plenumis tion (ion..)?" Li ne respondas. Mi redemandas "Ĉu estis iu kialo?" Iu el la klubanoj sen-pripense (kiel li poste konfesis) diris: "Verŝajne ne kialo, sed kialino". La klubanoj ekridegis kaj la demandito iom ruĝiĝis. Post duonjaro li konfesis, ke vere li ne plenumis tion, ĉar havis rendezuon kun junulino. La vorto "kialino" ne tradukiĝas al la rusa lingvo vorte, sed nur per frazo.

En la lasta tago de iu E-tendaro iulo demandis min, kie estas Viktoro Iljkaev. Mi ĉirkaŭrigardis kaj sen-pensi diris: "Jen li tablas". Viktoro tiumomente kurbigis kaj sur lia dorso unu tendarano skribis aŭto-grafon por alia tendarano. Por ege riĉa rusa lingvo la vorto "tablas" tradukiĝas ne per unu vorto, sed nur priskribe, ekzemple: "Li faras sin tablo". Similajn vortojn la E-pensokosmo aŭtomate produktas milionojn, sed nur se vi KONSTANTE uzas ĝin ĉe kontaktoj kun aliaj esperantistoj. KONSTANTE!!! En-strate, vagone, telefone, ĉe ajna E-kontaktiĝo.

### ...ni maĉis ĉifonojn kaj fritis aeron

Esperanta pensokosmo riĉiĝas ankaŭ per tradukoj el aliaj lingvoj. Se oni tradukas de unu nacia lingvo al alia oni kutime

## Loĝantoj de Esperantio vizitu la landon "Legio"

anstataŭigas naciismojn de tradukata lingvo per pli malpli (ofte neplene) similaj naciismoj de tradukanta lingvo. Ekzemple: "Hieraŭ venis al mi amiko kaj ni longe maĉis ĉifonojn pri diversaj temoj...". La rusa pensokosmo nefacile akceptas similan komparon. Pli facilas percepti "gratis la langojn...", nome tion uzas la tradukantoj ruslingven. Sed se vi LIBERE posedas esperanton, vi ĉe la legado, parolado kapablas PLENE ABSTRAKTIGI de via gepatra lingvo kaj ne stumblas ĉe la similaj frazoj, mi aldonu la alilingvajn:

"...fritis aeron...", aŭ: "ventolis siajn buŝojn", aŭ: "svingis la langojn", aŭ: "floris nia babilado" kaj tiel plu. La kunteksto ĉiam montras al vi, ke temas pri babilado, kaj diversaj nacioj esprimas sin diversmaniere. Kaj la menciitaj supre babil-esprimoj ne estas absolute la samaj. Ĉiu diras iom-iom alian pensmanieron, alian babil-agadon.

### ...falas en vastan puton de silento

Pri la profundeco de la estiĝinta silento, kiel ruse: "tomba silento" (гробовая тишина), = "tiom profunda silento, ke aŭdeblis fluga muŝo", mi elskribis jenajn naci-esprimojn el esperanto-tekstoj: "...kaj fiksrigardis unu la alian en densa silento."

"La silento fariĝis ankoraŭ pli densa." "...kaj subite kvazaŭ falis silento".

"...falas en la silenton de la morto."

"Denove ekfrostis silento..."

"De la plafono de la ekspoziciejo malrapide subenfalis la silento."

"Kiam Grandsinjoro aperis, silento tuj falis en la ĉambro."

"Peza silento malrapide tavoloĝis..."

"La silento ĉe la tablo fariĝis preskaŭ fantomeca".

"...en la silento, kiu dissternis sin ĉirkaŭ ni."

"Sed la ranĉistoj sin fortiris en vitrecan silenton".

"...ĉambro estis silenta kiel sonĝo".

"...ankoraŭ sonis kelkaj krioj, laŭtaj vortoj, poste la bruo sedimentiĝis".

"...estis mortsilente kiel en neĝa fosaĵo".

"... silentaj kiel ŝtonoj."

"...kaj li trovis ĝin silenta kiel la jarcentoj."

"...en silento tiel profunda kiel unu el nigraj truoj de la spaco".

"La silento kvazaŭ dispuŝis la murojn."

"... falas en vastan puton de silento..."

"La silento kloŝis sur ili..."

"La silento denove falis ..., same kiel polvo levita de venteto refalas."

"...silento, ke oni povus aŭdi akveron guti de tegmento."

"...la silento estis kiel tiu en arbaro kiam pepantaj birdoj ekvidas aglon."

"...ekregas silento malagrabra kaj tiel soleca kiel kloaka akvo."

"Do ni restis en profunda kazeiĝinta silento..."

"...silento kiu pli kaj pli fariĝis solida kiel glaciĝinta akvo.."

"...estiĝis silento tiel solida, ke oni preskaŭ povus palpi ĝin"

"...tia silento, ke oni povus farbi ĝin."

La fontoj de la suprecititaj ekzemploj estas la jenaj lingvoj: la angla, araba, bulgara, ĉina, franca, hispana, hungara, itala, japana, kroata, pola, sveda plus kelkaj artikol-aŭtoroj de neindikita nacieco. Kaj kiom da esprimoj pri la sama temo kuŝas en miloj da aliaj E-libroj, nelegitaj de mi!?

Krom konsili al vi MULTE LEGI EN ESPERANTO mi konsilas ĉiam elskribi la vortojn aŭ frazojn, kiuj ŝajnas al vi tre originalaj, freŝaj, nekutimaj por vi-nacia menso. Mi komence krajonumas tion en la legata libro kaj post tralegi ĉion elskribas, nepre indikante titolon, aŭtoron, naciecon, eldon-jaron kaj eldonejon. Sufiĉe baldaŭ vi iĝos posedanto de tre interesa kolekto, kiun poste eblos uzi, ĉu ĉe informo pri esperanto al novicoj, ĉu ĉe analizi kaj verki artikolojn pri la impeta evoluo de esperanto. Aŭ vi publikigu viajn lego-trovaĵojn en "Komencvanto".

Tiele vi iĝos amatora lingvisto, kia iĝis mi, kemiisto laŭ la antaŭa profesio. Fine mi diru, se esperantisto ne legas, aŭ legas malmulton esperant-lingve li restas analfabeto en la kultura lando Esperantio.

Anatolo Gonĉarov



Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

## Best-aboco

Jaguaro en ĝangalo  
Ja ne ĉiam estas gaja.

Ĵurnalisto fotas onin  
Ĵuras nepre foton doni.

Kat' miaŭas sur tegmento  
Kontraŭ bona komplimento.

Lupo hurlas en la kaĝo —  
Luno sur ĉielo naĝas.

Meleagro estas magra —  
Mankas gras' ĉe meleagro.

Najtingalo kantas belan  
Novan kanton sorĉfabelan

Ostro loĝas sur la grundo  
Oceana, en profundo.

Papilio buntkolora  
Petolante tuŝas floran.

Rinocero en salono  
Riverencas al leono.

Simieto sur liano  
Sin balancas antaŭ bano.

Ŝarko klakas per la dentoj,  
Ŝipon glutis evidente.

Testudeto rampas lante.  
Trenas l' vivon ĝi ne vante.

Urso ŝmace frambon voras —  
Uzas ŝancon ĝi, langvoras.

Vespo zumas ĉe plafono,  
Virtuoze tenas tonon.

Zebr'-ĉevalo liniita —  
ZOO-n venis por vizito.

L. L. Zamenhof

LINGVAJ RESPONDOJ

## Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj

Kelkaj samideanoj forte malaprobis la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj *cio, toro* k.t.p. (ekzemple: "civilizacio", "redaktoro" k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekzemple: "civiliz", "redakt") kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure *Esperanta* (ekzemple: "civilizo", "redaktejo", "redaktisto", anstataŭ "civilizacio", "redakcio", "redaktoro"). Kompreneble, se tia vorto, kiel ekzemple "redaktejo", estus tute identa kun la vorto "redakcio" kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto "redakcio" baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas *kontraŭ-Esperantaj*, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de *novaj vortoj*, mi opinias, ke ili eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple "redakcio", "civilizacio" estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la \$15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas *esper*, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos arĥaismoj kaj cedos sian lokon al vortoj "pure esperantaj"; ni povas eĉ *konsil* tion; sed *postul* tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ \$15) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj "pure Esperantaj". Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj. Estas vero, ke sekve de nia toleremeco ni por kelkaj vortoj havos dum kelka tempo formojn *duoblajn* (ekzemple: "evolucio" kaj "evoluo"); sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian "embarason de riĉeco", ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, eljetante el la lingvo vortojn, kies eljetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa.

Respondo 55,  
Oficiala Gazeto,  
IV, 1911, p222



## Pri divido de vortoj

Transportante la vortojn el unu linio en la sekvan, ni ordinare dividas ilin per iliaj partoj gramatikaj, ĉar ĉiu parto gramatika en nia lingvo prezentas apartan vorton. Tiel ni ekzemple dividas: "Esper-anto", "ricev-ita" k.t.p. Sed tio ĉi tute ne estas deviga regulo; ni faras ĝin nur por ne rompi subite kun la kutimoj de aliaj lingvoj: efektive tiu ĉi maniero havas nenian celon kaj signifon, ĉar la transportado de la vortoj estas afero pure papera, havanta nenion komunan kun la leĝoj de la lingvo; ni konsilas al vi per nenio vin ĝeni en la dividado de la vortoj kaj fari ĝin tute tiel, kiel en la donita okazo estos al vi pli oportune. Eĉ se vi dividus ekzemple "aparteni-s", ni vidus en tio ĉi nenion malregulan, kvankam la aliaj lingvoj (tute sen ia logika kaŭzo) ne permesas tian dividadon.

Esperantisto, 1893, p. 32.

# Tempo kaj homoj

Eric Walker [Ipswich, Anglio]

## Bildoj de infaneco

Dua Parto

Mi jam iomete priskribis la povran kvartalon, kie mi vivis dum mia infaneco kaj juneco. La stratoj de vicoj de ege malgrandaj domoj. Je la anguloj de tiuj stratoj normale la fina domo servis kiel malgranda butikoj kaj ankaŭ iam domoj en la mezo de la vico estis butiketoj. Ĉi tiuj butikoj estis malgrandaj, nur ĉirkaŭ 10 kvadrataj metroj. Je 200 metroj de mia domo estis ĉirkaŭ 10 butiketoj! Eble tial Napoleono diris "La angloj estas nacio de butikistoj". Plimulto de la malgrandaj butikoj vendadis bazajn nutraĵojn plus laĉojn, tablojdojn kontraŭ diversaj malsanoj (oni nun ne permesas multajn el ĉi tiuj medikamentoj, kiuj ofte estis danĝeraj...), unu vendis frititajn 'fish and chips', preskaŭ la brita nacia plado. En alia estis riparisto de botoj kaj ŝuoj, tre maljuna viro kun biblia nomo. Mi tre ŝatis sidi kun li kaj rigardi, kiel li laboras per siaj antikvaj maŝinoj, kaj mi sidadis kaj parolis kun li. Alia butikoj vendis gazetojn kaj revuojn kaj aliajn bagatelaĵojn. Ĝi ankaŭ havis malgrandan bibliotekon, el kiu la klientoj povis lui librojn kontraŭ du pencoj. La libroj estis nur la plej popularaj dum tiu epoko: detektivoj, amrakontoj, libroj pri vakeroj kaj ruĝ-indianoj. Ofte la verkistoj estis Edgar Wallace kaj Zane Grey, nomoj nun preskaŭ nekonataj. Mi ege, ege ŝatis legi en mia infaneco.


Kiam mi havis 11 jarojn mi komencis labori je la novaĵgazeta butikoj. Mia tasko estis liveri gazetojn al domoj. Matene mi laboris unu horon de la sepa, kaj poste revenis hejmen por matenmanĝi kaj iri al la lernejo. Je la kvina kaj duono denove mi liveris la vesperajn gazetojn, sed la tasko ne daŭris tiel longe, ĉar vespere estis nur du lokaj gazetoj. Matene estis du lokaj gazetoj plus la naciaj gazetoj. Kiel mi jam diris, mia granda amo estis legado, kaj mi ankaŭ ege ŝatis tuŝi librojn, kaj mi ordigis la librojn en la butika biblioteko.

Ĉiu vendrede mi devis iri al la butikoj, kie oni vendis frititajn fiŝojn kaj terpomojn por aĉeti iom por mia avino kaj mi. Ĉi tiu tasko estis iusence provo por mi, ĉar kiam mi estis infano, mi balbutis, tute ne povis diri frazojn, kiuj komenciĝis de la litero 'F'. Je la butikoj mi devis peti "fiŝon kun *fourpenyworth* (kvarpencan kvanton) de pomfritoj". Ĉi tiun frazon mi tute ne povis diri. La litero 'F' estis barilo. Mi rimarkis, ke se la litero 'F' estis en la mezo de la frazo, mi povis trapasi la barilon. Do, mi diris, tre rapide: "Ĉu vi havas fiŝon kun kvarpenca kvanto de pomfritoj, se jes - mi volas aĉeti ilin!"

Kiam mi havis 11 jarojn mi devis iri al pli granda lernejo, kiu estis ĉirkaŭ unu mejlon (1 kaj 3/8 kilometroj) for. Mi aŭ marŝis (ĉefe kuris!) aŭ mi uzis biciklon. Mi revenis hejmen tagmeze por manĝi (laboraj klasoj nomis ĝin 'dinner' (tagmanĝo) sed la riĉuloj diris

'lunĉo' ĉar ili manĝis 'dinner' vespere, dum ni vespere manĝis 'super' (vespermanĝo). Do mi iris kvar mejlojn inter hejmo kaj lernejo ĉiutage. En nia lernejo estis 400 knaboj kaj proksimume estis same ampleksa lernejo por knabinoj. Ĝi estis proksima al *Trent Bridge* (Trent Ponto) kaj la nomo de la lernejo estis 'Trent Bridge Lernejo por Knaboj'. En Britio ni ne havas numerojn por lernejoj, kiel en Usono kaj Rusio. Niaj lernejoj havas nomojn aŭ de la distrikto, aŭ nomojn de eminentuloj, lokaj kaj naciaj. Apud la lernejo fluis la rivero Trent kaj apud *Trent Bridge* estis la fama *Trent Bridge Cricket Ground*, kie oni ludis la nacian anglan (ne skotan, kimiran aŭ irlandan) someran ludon de kriketo. Ankaŭ tie estis la hejmo de '*Nottingham Forest Football Club*'. Pli proksime al mia domo dislokiĝis la klubo de alia piedpilka teamo: '*Notts County* (graflando)'. Tiu teamo, kvankam nun situanta en la malsupra ligo, havas tian distingon, ke ĝi estis la unua profesia futbala teamo en la mondo. Kiel infanoj ni dividiĝis inter la subtenantoj de unu teamo aŭ la alia, kaj estis granda tago kiam estis ludo inter ili. Mi ne volis elspezi la monon por spekti la futbalon, tamen oni kutime malfermis la pordegojn dudek minutoj antaŭ la fino, do, tiam mi eniris. Estis amuze rigardi la malan flankon de la kampo. Tie oni vidis amason de vizaĝoj de viroj, kiuj staris en vicoj. Se la ludo ne estis tre ekscita, homoj komencis forlasi ĝin antaŭ la fino. Oni povis vidi etajn fluetojn de vizaĝoj, moviĝantaj malsupren al la elirejo, tiel same kiel en 'sablaj bildoj', kiujn oni povas nuntempe aĉeti, kaj kiam oni turnas ilin, la sablo faras malgrandajn vojetojn dum ĝi falas de la supro malsupren. Estas strangaj la bildoj, kiuj restas en la kapo de infaneco! Dum miaj lernejaraj jaroj mi estis sufiĉe lerta, sed ne elstara. Mi estis bona je aritmetiko, preskaŭ neniam eraris, kaj en ekzamenoj neniam faris erarojn! Sed je algebro mi estis tute senespera, ne povis kompreni la abstraktajn aferojn. En arto kaj muziko mi ankaŭ estis malbona kaj en aliaj lernobjektoj estis meznivela.

Fino de la dua parto. Komenco en la 2-a kajero de "K"-2003



# Neelpensitaj historioj

Cui Jiayou [Lixin, Ĉinio]

语言障碍

## Lingvobaro

Pro malsato iu ĉina studgrupo pri konsumo eniris en restoracion en Nov-Jorko. Ĉar neniu el ili parolis la anglan lingvon, la grupestro petis menuon.


Li vidis, ke la unua linio en la menuo estis literoj grandaj kaj dikaj, tial li opiniis, ke tio certe estas la plej bongustaj manĝaĵoj kaj fingre montris tion al la servistino. Kun rideto la servistino kapjesis kaj deiris. Dum longa tempo la manĝaĵoj ne estis alportitaj, unu el la grupanoj ree alvokis la servistinon kaj remontris la unuan linion de la menuo al ŝi. Ŝi refoje kapjesis kun rideto kaj deiris. Sed post longa daŭro la servistino ankoraŭ ne donis la manĝaĵojn.

Ili turnis sin al iu ĉina studento ĉe la najbara tablo. Montrante la unuan linion de la menuo, la estro diris: "Jen, tiun ĉi ni volas". La ĉina studento ridegis: "Tiu ĉi estas muziko, kiu disaŭdiĝis en la restoracio jam du fojojn, vi jam aŭdis, ĉu ne?" Ĉiuj homoj en la grupo ruĝiĝis ĝis la oreloj, kaj decidis esprimi per gestoj, kion ili deziras. Ili volis la acidan lakton, tial ĉiu frapetis sian bruston per la manoj, poste etendis sian montran fingron, kaj faris geston, kvazaŭ oni prenas glason, por esprimi: "Mi volas glason...". Tamen, kiel gesti pri acida lakto? Por esprimi la vorton "acida", ĉiu ek-kuntiris la brovojn kaj aliformigis la buŝon, kvazaŭ ili trinkis vinagron.

Poste ili imitis muĝadon de bovo: metis la manojn sur ambaŭ flankojn de siaj brustoj kaj imitis melkadon. Post longa rigardado al ili la servistino verŝajne ekkomprenis kaj ripetis: "Bone, bone". Baldaŭ kun rideto ŝi revenis kaj alportis al ili glasojn da akvo kaj sendolorigajn tablojdojn. Siavice la ĉinoj ne komprenis, kaj ilia estro diris: "Tio estas mia kulpo! Kiel melkiĝi el niaj viraj brustoj? Mi devus venigi ĉi tien ankaŭ mian edzinon".

\*

Sadretdinova Naila [Voroneĵ, Rusio]



Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

## Originalo kaj kopio

Foje je somera matena horo mi aliris al skulptaĵo de Miĥail Ŝemjakin "Infanoj - viktimoj de plenkreskulaj malvirtoj" en la skvaro en Moskvo.

En la cento de la skulptaĵo estas tri ĉarmaj knabinoj, formantaj rondon en danco. Duoncirkle staras variaj fuguroj, prezentantaj iujn difektojn en homa naturo.

Ĉirkaŭe neniu troviĝis, mi elpaŝis al esprimplena figuro de maljuna virino, sur kies postamento estis skribita "Mizero". Magra, kurbdorsa, kun funebra mieno sur la vizaĝo. Mi proksimiĝis al la figuro kaj subite ekaŭdis post la dorso:

— Kion mi vidas, originalo venis rigardi sur kopion? — kaj sekvis ĝoja ridado de sukcesa frazo (sprita laŭ lia opinio).

Post mia dorso staris mezaĝa viro kun fotilo.

— Arogantulo! — rebatis mi, des pli ke mi ne estas kurbdorsa, sen funebra mieno, mia aĝo estas dume "oho-oho"(!!!), sed tute ne "aj-ja-jaj"!

\*

Karcev Jurij [Uljanovsk, Rusio]

## Sprita konsilo

Ekzemple mi jam delonge promesis po botelo kontraŭ ĉiu mia eraro en leteroj. Rezultas, ke:


1 — mi devas relegi miajn leterojn antaŭ sendi, kio ne malutilas ankaŭ por la senco;

2 — la leteroj estas senpage kontrolataj de spertuloj, kio helpas ekscii pri iu nekorekta lingvouzado. Eble ne multaj scias pri tiu promeso, sed kelkajn botelojn mi jam malgajnis.

Oni atingas sian celon nur, se oni ne devas atingi ĝin.

Franziska von Almsick

# AFORISMOJ



Bill Thorne [Londono, Britio]

El Germania gazetaro kolektis kaj esperantigis **Cezar** [Altenburg, Germanio]

La gazeto estas la konservujo de la tempo.

Karl Kraus

\*

Amu viajn malamikojn, ĉar ili diras al vi viajn erarojn.

Benjamin Franklin

\*

La poeto konstruas aerajn kastelojn, la legantoj loĝas en ili kaj la eldonisto enkasigas la lupagon.

Maksim Gorki

\*

Oldiĝantaj homoj estas kiel muzeoj: ne la fasado gravas, sed la trezoroj interne.

Jeanne Moreaux

\*

Arto estas mensogo, kiu montras al ni la veron.

Pablo Picasso

\*

Bezonatas sperto por kisi kvazaŭ kiel komercantino.

Zsa Zsa Gabor

\*

Vodko faras el ĉiuj homoj rusojn.

Ivan Rebroff

\*

Se buĉfabrikoj havus vitrajn murojn, ĉiuj homoj estus vegetaranoj.

Paul Mc Carthney

\*

Multaj homoj ne faras ion nur tial, ĉar neniuj malpermesas ĝin al ili.

Helmut Qualtinger

\*

La posedo de la vero ne estas terura, sed teda, kiel ĉiu posedo.

Friedrich Nietzsche

\*

La kapablo, kiun la homoj plej ŝatas, estas la pagokapablo.

Oskar Blumenthal

**Boguslaw Sobol**  
[Milanówek, Pollando]

Originale verkitaj  
Epigramoj

Malsaĝa nacio,  
se vivas sen Dio.

\*

Preĝi li ofte ŝatas.  
Poste najbaron batas.

\*

Lia agado -  
denuncado.

\*

Ne volas li labori.  
Preferas plendi kaj plori.

\*

Se li malriĉa vere estas -  
kial ne laboras, nur festas?

\*

Li uzas alkoholon  
por plifortigi volon.

\*

En lernejo li estis kreteno.  
Nun havas altan postenon.

\*

Al ŝi plaĉas,  
kiam klaĉas.

\*

Ĉu li sidas, ĉu li iras -  
al kaliko li sopiras.

\*

Li tiel forte ŝatas,  
ke proksimulon batas.

\*

La kunveno jam finiĝis,  
sed problemoj ne solvigis.

\*

Por ĉiu tago -  
alia flago.

\*

Li talenta estas  
kiam festas.

\*

Multe li parolas.  
Labori ne volas.

\*

Ne ĉiu papero  
diras la veron.

\*

Ankaŭ kuracistaj manoj  
suferas pro malsanoj.



### Boguslaw Sobol

[Milanówek, Pollando]

Oni gvidas ŝteliston al malliberejo.

— Kial oni vin gvidas tien? - demandas iu preteriranto.

— Ĉar mi trovis ŝnuron kaj prenis ĝin.

— Do tute ne ĉagrenu, oni liberigos vin.

— Sed al la ŝnuro estis io ligita.

— Kio?

— Bubalo.

\*

— Johano, mi petis vin, ke vi aĉetu kokinojn, kaj vi aĉetis hundon.

— Kaj kiu gardus tiujn ĉi kokinojn?

\*

Renkontiĝas du hundoj.

— Burek, kara, kiel vi aspektas. Terure!


Kiu vin batis tiel forte?

— Mia sinjoro.

— Ĉu vere? Ja li, kiam estas ebria batas nur la edzinon.

— Jes, sed hieraŭ li revenis hejmen

sobra.



Dalmatova Daŝa [Jelec, Rusio]

Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

## Ankaŭ bestoj parolas...

Du ĉevaloj interparolas.

— Kompatinda ĉevalo estas mi! Mi havas ne mastron sed veran ekspluatanton: mi, kiel azeno, laboregas ĉiutage de frua mateno ĝis nokto.

— Sed kial vi ne protestas? Sendu plendan skribon pri la senhonta ekspluatado de vi far la mastro al la animaldefenda societo esperantista!

— Kion vi konsilas al mi, amiko? Se la mastro ekscios, ke mi povas skribi kaj paroli en Esperanto, li tuj devigos min aldone priservi interreton en sia oficejo!

\*

Leono venigas sur grandan arbarkampon ĉiujn bestojn kaj diras:

— Venis tempo por fari "finan venkon" kaj ordon ĉi tie. Mi ordonas - la saĝaj kaj parolantaj Esperanton iru dekstren kaj belaj maldekstren. - La bestoj dividiĝas rapide je du grupoj, kaj nur makako daŭre sidas sur sia loko.

— Hej, ci, - la Leono graŭlas indignite. — Rapidu!

— Ne atendu tion tuj! Ĉu mi devas disŝiriĝi? - memfide kaj kokete

respondas la makako.

\*

Malsata krokodilo gvatante drivas laŭ la fluo de la granda rivero kaj subite vidas simion sidi ĉe la bordo kaj apetite manĝi bananojn.

— Hej, ho, makako, - vokas la krokodilo. — Ĉu vi ne deziras regali min per dolĉaj bananoj?

La makako malatentante la riveran monstron daŭrigas la konsumadon de siaj bananoj.

— Ĉu vi estas muta, ne komprenas krokodile aŭ tute ne parolas fremdajn lingvojn?

— Kial vi diras tion? - La makako salte leviĝas prezentante siajn ruĝajn sidvangojn. — Mi tre bone parolas en Esperanto kaj principe ne krokodilas kun nekonataj verdaj reptilioj!

— Jes, ja, posedante tian ruĝan gluteon vi tute ne bezonas parolkapablojn por komuniki al la verda popolo pri via avareco. - respondas moke la krokodilo al la avida ruzulo kaj neregaliite preterdrivas la bordon.

\*

Dimanĉe dum promeno tra parko renkontiĝas du hundoj, kiuj longe ne vidis unu la alian.

— Saluton, amiko! - Diras unu hundo.

— Kokerikon! - Respondas la dua.

La embarasita amiko scivolas:

— Kial do vi parolas tian strangan kaj nekompreneblan lingvon?

— Ho, mi servas nun kiel ĉefgardisto en tre bona kaj eminenta firmao kun alilanda personaro, kaj mi devas scipovi ankaŭ tiun ĉi malfacilan lingvon.

— Ĉu en la ofico vi ofte kokerikas?

— Ne tre ofte, fakte nur frumatene, kiam la ĉefo vekiga kaj afable salutas min.

\*

Porkino, vizitinte la unuan lecionon de Esperanto, kuŝas tre entuziasmigita en la malpura korta flako - nur la kapo videblas el la koto - kaj plengorĝe kantas: "Mi al vi donacos, mi al vi donacos, mi al vi donacos ringon el la or" ... La maljuna kato, kiu malŝategas la folan kaj ĉiam malpuran porkinon, sidas sur la fenestrobreto kaj desupre edife admonas ŝin.

— Porkinjo, kiel komencantino de Esperanto, vi eble ne scias, ke en ĉi tiu bela lirika kanto temas pri ies tre amata ĉevalino. Sed kiu vin, porkan ulinon, amas?


— Oni amas plej ofte ne pro la eskteraĵo, sed pro la animkora sinteno, kaj ankore mi estas pli ol ĉevalo, eĉ pli ol porko.

Enanime mi povas imagi min eĉ juna katineto. - Sprite sed maltrafe refutas la porkino al la kato.

*Nia fidela leganto el Svedio Ralf Jalming sendis interesan rakonton pri sia bela urbo Gotenburgo, kiu estis elektita kiel urbo de ĉi-jara Universala Kongreso.*

**Ralf Jalming** [Gotenburgo, Svedio]

## Gotenburgo - urbo de UK-88



**G**otenburgo estas la urbo kie okazos la ĉi-jara Universala Kongreso kaj bonvenigas ĉiujn kongresanojn. La urbo situas ĉe la okcidenta marbordo de Svedujo ĉe la rivero Gota kaj estas la dua plej granda urbo de Svedujo kun ĉirkaŭ 450.000 da loĝantoj. La urbo estis fondita en 1621 de la reĝo Gustav II Adolf. Nederlandanoj helpis konstrui la kanalojn en la urbo, kaj germanoj kaj skotoj multe kontribuis en la konstruado. Ĝi estas grava industria kaj

komerca urbo en suda Svedujo. Antaŭe ĝi havis plurajn grandajn ŝipkonstruejojn sed nuntempe nur malgranda parto restis de tio. La komerco kun aliaj landoj ĉiam estis granda kaj diversaj ŝipoj foriris kaj alvenis de ĉiuj partoj de la mondo. Estas vaste konata la granda aŭtofabriko "Volvo" kaj ekzistas ankaŭ aliaj specoj de industrio. La urbo havas universitaton kaj aliajn altlernejojn, ekzemple la teknikan altlernejon Chalmers. Oni nomas Gotenburgon urbo de la donacintoj. Pluraj riĉaj urbanoj donacis monon al lernejoj, hospitaloj kaj urbaj institutoj kaj tiamaniere kontribuis al la ĝenerala prospero.

Dum la granda elmigrado al Usono 1850-1920 pli ol unu miliono da homoj foriris de la lando tra Gotenburgo al la atendantaj ŝipoj.

En la urbo estas multaj diversaj muzeoj, inter ili estas la arta muzeo, speciale vizitinda kun multaj reprezentantoj de epokoj kaj stiloj, svedaj kaj alilandaj. Pluraj teatroj, koncerthalo kaj bibliotekoj zorgas pri la kultura vivo. Grandaj kaj malgrandaj parkoj donas eblecon por promenadoj kaj ripozo. Iom for de la centro estas interesa botanika ĝardeno kun diversaj tipoj de arboj kaj plantoj.

La granda amuza parko "Liseberg" estas unu el la plej grandaj en Skandinavio kaj estu nepre en la programo de la vizitanto. La urbo ne havas metron, sed havas bonan trafikan sistemon pere de tramoj kaj aŭtobusoj. La ĉirkaŭaĵoj de Gotenburgo estas vizitindaj. Ekster la marbordo estas arkipelago, kie la ventoj ofte estas fortaj kaj la okcidenta maro ĵetas siajn ŝaŭmantaj ondoj kontraŭ la klifoj.

Gotenburganoj estas konsiderataj kiel ŝercemaj homoj kaj du simbolaj figuroj de la urbo nomiĝas Kal kaj Ada pri kiuj oni rakontas ŝercemajn historiojn. Jen unu:

Ada diras al Kal: Mi legis en libro ke ekzistas sovaĝuloj kiuj vendas siajn edzinojn. Ĉu vi povus fari tion? Kal: Absolute ne, mi fordonus vin senpage!

\*

*La legantino el Germanio Dorothea Kaiser prezentas sian vican bongustegan kontribuon.*

**Dorothea Kaiser** [Altenburg, Germanio]

## Tavolsalato

Ĝi estas delikata salato el la nuna tempo, bone digestebla, freŝa, milda kaj manĝebla en ĉiu jarsezono. En Germanio ĝi estas tre ŝatata ĉe familaj festoj aŭ dum piknikoj (por 10 ĝis 12 personoj).

**Ingrediencoj**

1 glaso da raspita celerisalato \* 1 skatolo da maizo \* 2 maldikaj stangoj da poreo (150-200g) \* 3 pomoj \* 1 skatoletto da ananaso \* 5 ovoĵ \* 200g da tranĉita fromaĝo \* 400-500g da striigita kuirita ŝinko aŭ ŝinkokolbaso \* 1/2

glaso da salatkremo (sen herboj) \* 0,1 litro da dolĉa kremo aŭ kafkremo

**Preparo:**

Metu la tavolon da celerio en grandan pelvon kaj sur ĝin, tavolon sur tavolo, la maizon, la maldike tranĉitajn poreajn ringojn, la kubetigitajn pomojn, la ananasajn pecojn, la ovojn, la raspitan aŭ tranĉitan fromaĝon kaj la striigitan ŝinkon aŭ la ŝinkokolbason.

2) Kirlu la dolĉan kremon kaj la salatkremon kaj verŝu la miksaĵon sur la tavolojn en la pelvo.

3) Lasu stari la salaton kelkajn horojn aŭ dum nokto.

**Mia konsilo:**

Ne turnmovu je la fino la tutan salaton, kiel oni farus kun aliaj salatoj, sed elprenu la porciojn per eltranĉo, kiel tortopecojn. La salato en tiu kazo aspektas sur via manĝotelerio pli bela.

Agrablan apetiton!

Bill Thorne



RIMARO

ERO

afero  
 ansero  
 atmosfero  
 bero  
 biero  
 butero  
 cetero  
 cifero  
 danĝero  
 ero  
 espero  
 fero  
 fiero  
 infero  
 kajero  
 kamero  
 kancero  
 karaktero,  
 karcero  
 kariero  
 koĉero  
 kolero  
 kratero  
 kulero  
 letero  
 mizero  
 monero  
 numero  
 ofero  
 opero  
 pantero  
 papero  
 pasaĝero  
 pasero  
 prefero  
 revolvero  
 rivero  
 sfero  
 sukero  
 telero  
 tero  
 vakero  
 vero  
 vespero  
 vetero

## Pri "Vojaĝo" por la legantoj de "Komencanto"

Pri la dua eldono de mia libro "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo" aperis multe da pozitivaj recenzoj kaj prezentoj en multaj landoj. Mi klopodos diri al la legantoj de la gazeto "Komencanto" ion, kio ne estis dirita antaŭe.

Mi komparus "Vojaĝo"-n kun luksa restoracio, en kies menuo troviĝas centoj da bongustegaj, delikataj pladoj (=tekstoj), kiujn oni manĝas dum 26 vizitoj (lecionoj). Tiamaniere oni ne nur ĝuas la vivon, sed ankaŭ plivastigas sian horizonton.

Malgraŭ tio, ke la tekstoj estas diversaŭtoraj, diverstemaj kaj diversspecaj, la leganto havas nekularan senton, ke io ilin unuigas. Sed kio? Mi diras al vi la sekreton: mia persona gusto. Mi zorge elektis nur tiajn tekstojn, kies aŭtoro mi volonte estus. Tial la libro estas mirinde unueca malgraŭ sia granda diverseco.


Oni jam skribis, ke "Vojaĝo" celas perfektigi krear lingvoregadan, prezenti en facile digestebla formo la Esperantan kulturon kaj igi la vivon de Esperanto-kluboj multe pli varia kaj interesa. Sed tio ne estas ĉio. "Vojaĝo" instigas aĉetadon kaj legadon de bonaj libroj kaj klare nomas tiujn librojn. "Vojaĝo" preparas la studenton por la meznivela ekzameno de UEA/ILEI (por tio sufiĉas detala trastudo de duono de la lernolibro) kaj estas bona bazo (kun kelkaj aliaj libroj) por pli altaj ekzamenoj supera kaj instrukapablige.

La ekzercoj en la "Lingva praktiko" estas nebanalaj, evoluigas memstaran pensadon kaj kreas fantazion.

Tiu neordinara lernolibro preparas la studentojn fariĝi kompetentaj kursgvidantoj, klubestroj, redaktoroj, verkistoj, tradukistoj, lingvaj reviziantoj, aktivuloj kaj gvidantoj de landaj kaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Sed kial mi diras al vi tion? Havigu al vi ekzemplon de "Vojaĝo" kaj ekposedu ĉion menciitan supre. Via esperantista sorto estas en viaj manoj. Aligu al centoj kaj miloj da "vojaĝantoj", kiuj vojaĝas kun plezuro kaj utilo per "Vojaĝo"!

Boris Kolker,  
via ĉiĉerono en Esperanto-lando



ekskluziva foto por KOMENCANTO

## Anoncetoj

## Informoj

## Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

## KARNAVALA, NACIA KOSTUMO DE TUTA MONDO

Karaj samideanoj! Kostroma E-Teamo invitas vin partopreni letervesperon, kiu okazos komence de decembro 2003-a en Kostroma Regiona Scienca Biblioteko. Temo de la letervespero estas "KARNAVALA, NACIA KOSTUMO DE TUTA MONDO, iliaj specialecoj kaj diferencoj. Bonvolu sendi al ni bildkartojn aŭ fotojn kun bildoj de karnavalaj, naciaj kostumoj, infanaj kaj plenaĝulaj. Skribu, kiaj karnavalaj festoj okazis en via urbo. Respondo post la vespero estas garantiata. Anticipan dankon.

Kostroma Esperanto-Teamo <keto44@mail.ru>

La poŝta adreso estas tiu de Elena Serova ĉe la najbara adreskadro →

Mi estas 34-jara virino. Mi deziras korespondi kun tuta mondo. Kolektas tel/k-ojn kaj kamaval-kostumojn.

*Jelena Serova*  
str. Ivana Susanina,  
54/17-79  
156005, Kostroma,

**Rusio**

Lerneja grupo de 21 geknaboj 10-jaraj lernas Esperanton. Por komenci ili preferas kolektivan kor-don.

Prof. *Mihai Trifoi*  
ĉe Scoala cu cls.I-VIII  
Mikes Armin  
RO-4038 Bixad,  
Jud.Covasna

**Rumanio**

<scosalabixad@honoris.ro>



Petrova Elena [Magnitogorsk, Rusio]

31-ja, edziĝinta, laboras kiel kamionŝoforo, angolano, loĝanta nun en Kongo.

*Pires Nimi Makani*  
B.P.648 Matadi 1  
N. 25 av. Nsisanzi  
C./Nzanza  
**Kongo**

Mi deziras korespondi tutmonde

*Makarenko Valerij*  
p.k. 01243  
TVERJ  
170001

**Rusio**

Deziras kor-di tutmonde

*Emile*  
*Malanda Nianga*  
B.P. 761  
Kinshasa XI  
R.D.Congo  
**Kongo**  
emalanda@caramail.com

Mi estas 30 jara fraŭlo, komencanto, studento por la doktor-diplomo en teologio. Interesoj: religio, studi fremdajn kulturojn kaj landojn, lingvoj, legi sciencfikciajn kaj fantazian literaturon, (kaj verkado iomete en ambaŭ), muziko, kuirado. Mi ŝatus korespondantojn el Azio aŭ Orienta-Eŭropo, sed mi skribos al ĉiuj, kiuj skribos al mi. Mi preferas paper-poŝton, sed ankaŭ korespondos retpoŝte.

*Donald Jacob Uitvlugt*  
836 Sorin St.  
South Bend, IN 46617  
**USA**  
<duitvlug@nd.edu>

Mi estas 47 jara, mi ŝatas literaturon, kinon. Mi ŝatas vojaĝi per Esperanto, kiu volas korespondi kun mi?

*Jamet Joelle*  
1, Rue de la Poste  
FR — 03110  
St. Remy en Rollat  
**Francio**  
jameo03@yahoo.fr

Mi estas 32 jara pastro por kristana eklezio. Int: piedvagi, tendumi, amatora radio. Mi serĉas amikojn el orienta Eŭropo, Rusio (la tuta eks-Sovetunio).

*Taylor Francis*  
2211 W. Austin  
Nevada, MO 64772  
**USA**  
ka5nom@netscape.net

Estimataj samideanoj! Saluton el lando de Everesto, la pli alta monto de la mondo, centro de hinduismo kaj budhismo! Mi estas Navin de Kathmandu, Nepal. Mi volas amikumi kaj esperantumi. Bonvolu skribi al mi poŝte. Miaj nobioj estas instruado, bildkarto, legado, vojaĝado, bildoj, numizmatiko ktp. Bondezire kaj atendante

*Navin Lal Shrestha,*  
GPO Box 11753,  
Kathmandu,  
**Nepal**

Mi estas 17 jara komencanto. Mi ŝatas tablotenison, desegnas per krajono. Int: pri kulturo...

*Raymond LU*  
160 H. B. Gonzales Street,  
Loyola Heights,  
Quezon City, Metro Manila  
**Philippines**  
<nuccha@pisay.com>

Mi estas 40 jara komencanta esperantisto. Mi estas komputilisto. Int: literaturo, sciencfikcio, internacia muziko, biciklado, TRIZ teorio, internaciaj kulturoj.

*David Henderson*  
735 W Stanford Ave  
Gilbert, AZ 85233  
**USA**  
<cadetpirx@qwest.net>

Bonvolu noti retpoŝtan adreson de **KOMENCANTO**

**komencanto@r66.ru**

vijaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

